



Xerihan, kun sia patro Xelef, tenas afiŝon kun la bildo de sia patrino.

LA VUNDOJ DE KURDIO KAŬZITAJ DE IŜ

Pasintan marton(*), la Siriaj Demokrataj Fortoj⁽¹⁾ venkis la Islaman Ŝtaton en Baguzo⁽²⁾, la lasta bastiono de la kalifejo. Kvin jarojn pli frue, kiam la IŜ estis disvastiĝanta, ĝi kaŭzis genocidon en Ŝengalo⁽³⁾ kontraŭ la jazida minoritato: oni kalkulas, ke ĝi murdis milojn da homoj kaj ke aliaj miloj devis forfuĝi por savi sian vivon. Nuntempe, ankoraŭ malmultaj kuraĝas reveni kaj rakonti sian historion.

Por Xarihan la koŝmaro komencis la 3-an de aŭgusto de 2014. Tiun tagon, la 19-jara knabino estis hejme, kiam ŝia patro aperis kun vizaĝo kuntirita kaj kriante: la ĝihadistoj de la IŜ estis atakintaj la sudon de Ŝengalo kaj buĉintaj ĝian loĝantaron. “Tiam mi ne komprenis, kio estis okazanta, sed tuj mi komprenis la gravecon de la situacio”, ŝi memoras ĉagrene, klopodante reteni siajn larmojn.

La genocido estis komencinta. Laŭ sistema maniero oni murdis milojn da homoj, kaj la ceteraj strebis fuĝi al la montaro, de la urbo al la nordo. “Ĉar ni vivis en Sinuno⁽⁴⁾, ni disponis tempon por atingi la landlimon kun Sirio kaj tie nin rifuĝi, antaŭ ol la ĝihadistoj aperis.” Ŝi daŭrigas: “Sed, ĉar ni estis tiom, ne ĉiuj havis lokon en la veturilo; tial mia patrino, mia frato kaj mi restis en la domo, atendante, ĝis oni revenos por kunporti nin.”

Post ne longe, oni tranĉis la vojojn, kaj Xelef – la patro de Xarihan – ne povis reiri por ilin serĉi. Tiam ili decidis sin kaŝi en la monto, same kiel jam estis sin kaŝintaj miloj kaj miloj da homoj. “Tie ni pasigis tri tagojn, sen akvo nek manĝo, ĝis ni devis reveni por ion serĉi. Elirante el nia domo, el ie ajn alveninta ruĝa kamioneto atendis nin, kun du ĝihadistoj ene. Panjo suplikis, ke ili kunportu nur ŝin kaj min lasu por prizorgi mian fraton, ĉar li estas kriplulo, sed ili surdis al la petoj kaj nin ĉiujn enkamionetigis por nin konduki ien ajn”, ŝi asertas.

La montaro estiĝis ilia nura forfuĝejo. Afero de vivo aŭ morto. Tien alvenis Dilbrin kaj ties kvin infanoj, serĉante rifuĝon. Tiu 29-jara virino vivis kun sia familio en Telkesebo⁽⁵⁾, vilaĝo sude de Ŝengalo. Kiam la bandoj de la IŜ alvenis, la edzo de Dilbrin kaj aliaj loĝantoj de la vilaĝo decidis batali kontraŭ ili, por ke almenaŭ la virinoj kaj infanoj povu fuĝi. “Ni marŝadis dum naŭ tagoj sen io ajn por manĝi kaj kun ne tro da akvo. Estis tre penige. Kelkajn monatojn poste mi akuŝis bebon, sed ĝi ne pluvivis”, ŝi diras bedaŭrante, kun veo kaj malĝojo enokule.

Popolo malamegata de la IŜ

La montaro estis la nura loĝejo por Dilbrin kaj aliaj miloj da delokigitaj. Kune ili organizis la rifuĝintareon de Serdeŝto⁽⁶⁾ amaso da tendoj kaj kabanaĉoj haste starigitaj meze de kotejo, kiuj inundigas ĉiam, kiam pluvas. Dumvintre la malvarmo estas neeltenebla. “Mi konsideras min feliĉa. Fakte, mia bofrato estas peŝmergo kaj danke al lia negranda salajro ni ĉiuj havas ion por manĝi. Sed mi perdis ĉiun esperon havi pli bonan vivmanieron”, ŝi diras aflikte.

Xarihan kaj ties familio estas membroj de la jazida etno, kiu de pratempe vivas en la Ŝengal-regiono. Tie ili estas ĉirkaŭ milionduono da homoj, kaj, krome, estas aliaj 200 000 dislokitaj en Sirio, Turkio kaj Irano. La membroj de tiu ĉi religia minoritato preĝas al la anĝelo *Tawusê Melek*, reprezentata kiel pavo, kiu estas la plenumanto de la dia volo, ĉar dio estas en tiel alta nivelo, ke oni ne povas ĝin rekte adori. La jazidoj estas la popolo pleje malamata de la ekstremistoj de la IŜ, kiu ilin konsideras adorantoj de la demono kaj rezervas por ili la punon plej kruelan.

Apud ŝi, atenteme aŭskultanta, estas ŝia patro senĉese fumanta kun rigardo forperdita. “Oni forportis nin en la kamioneto ĝis la ĉirkaŭaĵojn de iu urbo, Telafaro⁽⁷⁾ aŭ Mosulo. Subite, mia patrino eltiris la pistolon, kiun ŝi estis preninta hejme, kaj forpafis la akompananton de la stiranto. Tiam, la stiranto haltigis la veturilon kaj pafis al mia patrino. Poste, li ŝin bruske eligis el la veturilo kaj apud la ŝoseo ŝin elfinis. Tie ŝian kadavron li forlasis”, rakontas la juna knabino.

De tiam, la vivo turniĝas al ŝi kiel nura sufero. Tion ŝi memoras hodiaŭ, sidanta sur planko de sia domo, kien ŝi revenis por vivi kune kun la patro kaj aliaj familianoj. Malmultaj kuraĝas reveni, kaj pli malmultaj kuraĝas rakonti sian historion. “Ne eblas al mi forgesi la rigardon de mia frato, kiam oni nin disigis. Mi ne povas forviŝi el la memoro tiun bildon. La lasta, kiun mi aŭdis de li, estis, ke mi pardonu lin pro io ajn okazinta, se ni neniam plu revidos nin denove. “Simple pardonu min.” Eble oni murdis lin tiun tagon mem, aŭ iam ajn.”

La sorto de la viroj estis la morto. Tiu de multaj virinoj, precipe de Xarihan kaj tiom da adoleskantinoj, estis iĝi seksaj sklavoj de la ĝihadistoj. Oni kalkulas inter 6000 kaj 7000 la jazidinojn, kiujn la IŜ ostaĝigis dum tiu atako. Dum ilia kaptiteco, oni ilin seksperfortis, mistraktis kaj aŭkcias vendis, same kiel oni aŭkcias brutojn. La plej bonsortaj povis esti liberigitaj kontraŭ la pago de elaĉeto fare de la Regiona Kurda Registaro⁽⁸⁾ aŭ de iu familiano.

“Oni kondukis min al lernejo kune kun aliaj knabinoj. Tiam oni devigis min surporti hiĝabon kaj paradi antaŭ kelkaj viroj. Mi estis 15-jara kaj, ĝis tiam, mi neniam estis pensinta, ke oni povas komerci per homoj; sed, depost tio, mi ne memoras kiomfoje oni vendis min, almenaŭ 15 fojojn dum tri jaroj kaj duono”, ŝi rakontas precize.

Oni portis ŝin al Sirio kaj, interalie, ŝi estis en Rakaho kaj Alepo. Ŝi gravediĝis sed perdis la bebon pro la batado, kiun donis al ŝi la forrabinto, sciinte pri ŝia stato. “Mi klopodis suicidi, sed mankis kuraĝo al mi. La tagojn mi pasigis pensante pri miaj familianoj kaj mia frato; pri kio okazis al la korpo de mia patrino, kiu restis forĵetita ie apud la vojo; ĉu ĝi estis forvorita de la bestoj aŭ ĉu iu povis ĝin preni. Mi esperis nur, ke oni savu aŭ iel mortigu min.”



Virinvestoj apud amastombo en Ŝengalo.

La urbo, detruita

Kvar jarojn post ties liberigo, Ŝengalo estas fantomo. La timo paŝas laŭ la stratoj, kaj la fetoro de la detruado flareblas en la atmosfero. Pli ol 70 % el la urbaj konstruaĵoj estas detruitaj, bruligitaj, elrabitaj. Neniu vivas tie. Ankaŭ ne estas spuro de la 50 000 urbloĝantoj. Nur aro da katoj kaj iuj soldatoj en la kontrolpostenoj de la urbenirejoj por akcepti la vizitantojn. Fakte, por eniri la urbon oni bezonas specialan permeson.

Jiyanda estas 18-jara kaj membras en la IPTŜ⁽⁹⁾, milico kreita por protekti la regionon kaj formita nur de inoj. “Mi estis studenta en la lernejo, kiam la IŜ atakis nin, kaj ni devis forfuĝi montaren nur kun tio, kion ni surportis. Ni restis kaŝitaj senmanĝe dum dek tagoj. Poste la PLK⁽¹⁰⁾ malfermis sekuran vojon, kaj ni sukcesis atingi Sirion. Tie ni restis en rifuĝintareo. La vivkondiĉoj estis teruraj kaj mia unujara fratineto mortis”, ŝi rakontas sorbante tason da teo en la ĉefstabejo de sia taĉmento, unu el la malmultaj domoj en la urbo ankoraŭ starantaj. “Pasis la jaroj, kaj mi pensis, ke mi devas ion fari. Tial mi aliĝis al la taĉmento, por helpi mian popolon kaj la virinojn, kiuj suferis kiel mi”, sendube asertas tiu ĉi milicianino, preta oferi sian junecon batalante por siaj idealoj.

La tempo senkompatate pasis por Xarihan, ĝis kiam ŝi sukcesis akiri poŝtelefonon kaj voki iun el siaj fratoj. Ŝi povis transdoni informojn pri si, kaj membroj de la Fronto de la Venko⁽¹¹⁾, kiu ŝin retenis en Idlibo⁽¹²⁾, akceptis vendi ŝin al ŝia familio kontraŭ 13 000 dolaroj. Kiam ŝi revenis, ŝi pezis 30 kilogramojn kaj estis detruita, korpe kaj spirite. Ŝi pensas, ke ŝi perdis senrevenue sian infanecon, kaj ke tio estas ŝia nura vivsperto. Tial, de tempo al tempo, ankoraŭ revenas al ŝi la deziro memmortigi sin. Ŝi bezonas psikologian flegon, sed la rehabilitprogramoj ne atingeblas por ĉiuj.

Ekstere komencis pluvi. Xarihan maltime trapasas la domsojlon kaj trairas iujn tritikkampojn. Unuafoje ŝi revenas al la loko, kie ĉio komencis. “Neniam plu mi kuraĝos transpasi tiun ŝoseon”, ŝi ne kapablas diri ion ajn pli. Tuj ŝi falas kaj, manpremanante la sanktan teron de la jazidoj, ŝi ekpreĝas por sia patrino, plorĝemante.



La 12-jara Jiyanda, membro de la IPTŜ

Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj).

- (1) Siriaj Demokrataj Fortoj (SDF)/Hêzên Sûriya Demokratîk (HSD).
- (2) al-Bāğūz Fawqānī , en la araba. Baxoz, en la kurda.
- (3) Şengal.
- (4) Sinunê.
- (5) Tel Qeseb.
- (6) Serdeşt.
- (7) Tell Afar, en la kurda. Telafer, en la turkmena. Tal'afar, en la araba.
- (8) Regiona Kurda Registaro (RKR)/Hikumetî Herêmî Kurdistan (HHK/KRG). Temas pri la registaro de aŭtonoma kurda teritorio en Suda Kurdio/Bashurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la Iraka ŝtato.
- (9) Inaj Protekt-Taĉmentoj de Ŝengalo (Yekîneyên Parastina Jin ê Şengalê).
- (10) Partio de la Laboristoj de Kurdio (PLK)/Partiya Karkerên Kurdistan (PKK).
- (11) Ĝabhat an-Nuşra, en la araba.
- (12) Idlib, en la araba.

KLARIGOJ:

Aŭtoro: J. M. López.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 8-an de Aŭgusto 2019-a.

Tradukis: NXC. Aŭgusto 2019-a. Provlegis: DS.

